


Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2020

Jarkolekto 7 - Numero 4



Medalego de 1987 sur muro de la 6a liceo en Bjalistoko, iama reala gimnazio, en kiu L.L.Z. lernis

ENHAVOTABELO

de oktobro 2020

Titolpaĝo: <i>Medalego en Bjalistoko, sur muro de gimnazio kie L.L.Z. lernis</i>	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	4
<i>75a UEA-kongreso en Havano 1990</i>	
<i>Memore de Tālivaldis Indra (1894-1942)</i>	
<i>76a Universala Kongreso de Esperanto Bergeno 1991</i>	
Spikumajoj & suplementoj: La unua medalo kun bildo de Zamenhof ...	7
Esperantaj valormarkoj: Olimpiada garantifonda marko	12
Por spuremuloj!	14
Aspektoj de numismatiko: Fidata mono: novaj perspektivoj! (1)	15
Medalistoj: 23 AleksandrSolomin (°1941)	17
Historiaj aspektoj: Kio estis C.S.I.E.?	18
Terminaro: Alfabeta listo (23)	20
Numismatika Forumo: Nuntempa medalarto	21
El la gazetaro: Parlamenta medalo por Povilas Jegorovas.....	22
Retpoŝto	23
Anoncoj & eventoj	34

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

Kiel abonanto de diverslingvaj revuoj mi lastatempe legis multe da redakciaj enkondukoj kun samspeca temo: la sekvoj de la terura katastrofo kaŭzata de la pandemio de 2020(-2021).

Nu, ne timu, mi ne intencas lupe hurli inter lupoj. Mi preferas laŭdi la solvon, elpensitan de UEA, por unuafoje organizi Virtualan Universalan Kongreson de Esperanto. Tial Elda Dörfler kaj James Rezende Piton, respektive la itala prezidantino de ELF-Arek kaj la brazila retejestro de la komuna retejo de ELF-Arek kaj ENA, preparis – ne sen praktikaj malfacilaĵoj por almenaŭ unu skipano, via servanto – komunan prezentadon inter la 1a kaj la 8a de aŭgusto kun la du fakgrupoj en la kadro de la unua Virtuala Movada Foiro de tiu UK. Do, en la jarlibro de UEA oni iam trovos dufoje la saman Universalan Kongreson, tiun en la reto, kaj la “normalan” en 2022 en Kanado, kondiĉe ke la pandemio ne gajnos la konkurson...

Ĉiel, por nia trio de partoprenintoj tio estis neforgesebla evento kaj valorega sperto, kiu povos baldaŭ malfermi la pordon por pli efikaj korespondado kaj kunlaborado inter nia gefrata filatela asocio kaj ENA mem.

Nu, dum ĉi tiu sama krizo, nia nura kazaĥia membro, Vjeĉeslav Nasretdinov, sukcesis varbi por ENA du samideaninojn el Kazaĥio. Do, dank’ al li, ni aktuale havas 143 individuajn membrojn. Gratulon kaj koran dankon al vi, kara Vjeĉeslav!

Se vi nun estas leganta ĉi enkondukon de la lasta numero de la sepa jarkolekto, vi certe konscias, ke sekvos priskriboj de “novaj” medaloj, sekve diversaj artikoloj, i.a. pri la sekretoj de la unua medalo kun portreto de Ludoviko, pri olimpika valormarko, pri historiaj aspektoj de rara brustostelo, pri diversaj aspektoj de numismatiko, pri dokumento el la gazetaro, pri pliaj terminoj kaj laste, sed ne balaste, pri diversaj korespondaĵoj inter legantoj, interesuloj kaj la redakcio.

Kiel meditindaĵo kaj spiritprovokaĵo ni hodiaŭ fincele “donacetas” al vi, kara legantaro, saĝan aforismon far la famega irlanda poeto kaj verkisto Oscar Wilde (1854-1900):

“Mondmapo sen indiko de Utopio tute ne meritas atenton.”



MONEROJ & MEDALOJ

Tipo A 1 – Esperanto-moneroj kaj -medaloj

75a Universala Esperanto-Kongreso en Havano 1990



Lando: Kubo

Metalo: kupronikelo

Diametro: 32,5 mm

Jaro: 1990



Kvanto: *nekonata*

Pezo: 18,00 g

Medalisto: *nekonata*

Diko: *nekonata*

Averso:

esperantostelo kun litero E super skizo de la “Granda Insulo”

meze, maldekstre kaj sube: “KUBA ESPERANTO-ASOCIO”

Reverso:

meze: grandcifera nombro 75, okaze de la organizo de la 75a UK en Havano. Ene de la cifero “7”: prilaborita steleto. La du ciferoj havas komunan parton en la mezo.

ĉirkaŭe: “UNIVERSALA ESPERANTO KONGRESO HAVANO 1990”

Rimarko:

dum la 75a UK la Kuba Esperanto-Asocio vendis ŝlosilportilojn kun *medaloforma* disko. Cetere aperis du medaloj jam priskribitaj en jarkolekto 3, numero 4, p.6-7.

Tipo D 1 – Unuflankaj medaloj

Memore de Tālivaldis Indra (1894-1942)



Lando: Latvio

Kvanto: *nekonata*

Metalo: bronzo

Pezo: 82,20 g

Diametro: 71 mm

Medalisto: Jānis Strupulis

Jaro: 1989

Diko: 2,50 mm

Averso:

supre (en ekstera ringo): TĀLIVALDIS INDRA

meze, portreto de Indra, parte dekstren. Medalista signo + jarindiko.

sube: (en la ekstera ringo): 1894 - 1942

Rimarko:



Indra naskiĝis la 14an de septembro 1894 en Live (apud Riga). Junule li finis la ekonomian fakultaton de la Latva Universitato en Riga. Profesie li estis dogana eksperto kaj instruisto en komerclernejoj kaj li vivis kiel vegetano kaj abstinemulo.

Li esperantistiĝis en 1914 kaj iĝis estrarano de la Moskva Esperanto-Societo (1915 ĝis 1920) kaj diplomita instruisto ĉe la Moskva Instituto de Esperanto.

En 1921 Tālivaldis organizis la movadon en Riga kaj iĝis estrarano de la Latva Esperanto-Societo (1921 ĝis 1924 kaj 1928 ĝis 1932); okfoje li estis ĝia prezidanto.

Li ankaŭ funkciis kiel UEA-delegito ekde 1922, kiel ĉefdelegito ekde 1925.

Cetere li estis prezidanto de la unua Baltlanda Esperanto-Kongreso en Riga en la jaro 1930.

En 1928 li tradukis latven la “ĉefŝlosilon” kaj kompilis la unuan pli ampleksan latvan Esperanto-vortaron “Ileva” en 1932. Krome li estis ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio de Esperanto.

Fontoj: - Hans Jankowski: “Esperanto-Medaloj 1912-1915” p. 18
- “Enciklopedio de Esperanto”, A-Ĵ, p. 239 kaj p. I 1 (foto)

Tipo D 2 – Murmedalonoj

76a Universala Kongreso de Esperanto en Bergeno 1991



Lando: Norvegio

Kvanto: *serĉata*

Substancoj: ligno + bronzo

Pezo: 200 g

Jaro: 1991

Medalisto: *serĉata*

Diametro: ligna disko: 162 mm
bronza disko: 132 mm

Diko: 15 mm

Averso: (*unuflanka medalo*)

Ĉirkaŭskribo: 76-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO - NORVEGIO - BERGENO

Meze: “1991” kaj bildo de veloŝipo

Bronza medalo



Bronza medalo kun pendigileto



Arĝentita medalo



Ĉu arĝentita falsajo?



SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

La unua kaj plej mistera kaj plej enigma Esperanto-medalo

1. Jam diversfoje en nia revuo

Ĉi medalo jam aperis kiel dua priskribita medalo en la unua numero de la unua jarkolekto (2014), sur la paĝoj oka kaj naŭa. Sekve en numero tri de la dua jarkolekto (2015) sur la paĝoj dek-sesa kaj dek-sepa, ankaŭ en numero unu de la kvina jarkolekto (2018), sur la paĝo dek-tria.

Hans Jankowski, nia karmemora honora membro, unue priskribis la medalon en sia broŝuro “Esperanto Medaloj 1912-1995”. Laŭ liaj informoj ĝi estis eldonita en 1912 (la jaro, en kiu aperis la du spesmilo-moneroj de René de Saussure) laŭ iniciativo de la franca Esperanto-gazeto “La Movado”, kiu estis fondita en 1909 de Émile Houbart. Tiu gazeto, kun subtitolo en la franca “Espéranto-nouvelles”, sin prezentis tiel esperante: “monata universala gazeto (propagando, informo, komerco k.t.p.); Parizo.” Ĝi estis eldonita en du serioj: unue de 1910 ĝis 1914, poste de 1923 ĝis 1933.

La medalo estis unufoje anoncele montrita en “La Movado”, en la jarkolekto tri de 1912. Laŭ Hans Jankowski ĝi estis ofertita al vendo ankoraŭ en la jaro 1927, do dum almenaŭ dek ses jaroj! Ĝi estis produktita en diversaj alojaj specimenoj: flava bronzo, arĝentita bronzo, origita bronzo, arĝento kaj origita arĝento. Ekzistas ekzempleroj kun kaj sen pendigileto.

Rimarko: jen la 1a enigmo.

Sur ĉiuj specimenoj troviĝas, vertikale - sed horizontale gravurita - enigma vortgrupo en la franca. En ĝeneralaj francaj vortaroj oni ne trovas la vorton “**frique**”. Ekzistas tamen vortoj kiel “l’Afrique” (Afriko) kaj “afrique” (afrika). Ĉu mankas la litero A? Se jes, kial do? Spaco por plia litero sufiĉis... do kio estas la klarigo?

Ekzistas en la franca vortaro la adjektivo “**atlantique**” (atlantika) kiel en “l’Océan Atlantique” (Atlantika Oceano). Ni scias, ke la stela simbolo de la esperantistaro direktas al kvin kontinentoj; kiam oni trovas sur bildo la nomon de unu el ili, ankaŭ la aliaj nomoj aperas. Kion do signifas “**FRIQUE ATLANTIQUE**”?



2. Rezultoj de detala komparcela ekspertizo

2.1. Bronzaj ekzempleroj



2.1.1. sen pendigileto

2.1.2. diametro: 42 mm

2.1.3. pezo: 29,54 g

2.1.4. **portreta flanko:**
super la dekstra ŝultro:
medalista signo (?)



Sub la maldekstra roverso:
nomo de la eldoninto
F. MAGDELAINE EDIT



2.1.5. **reversa flanko:**
F. MAGDELAINE
(maldekstre, sube)



kun pendigileto

diametro: 42 mm

pezo: 29,80 g

portreta flanko:
super la maldekstra ŝultro:
medalista signo (?)



sub la maldekstra roverso:
nomo de la eldoninto
F. MAGDELAINE EDIT



reversa flanko:
F. MAGDELAINE
(maldekstre, sube)



SENS
JUIN 1908

mankas



Rimarko: jen la 2a enigmo. La gravurita, aldona teksto mencias la francan urbon SENS kaj la daton JUIN (junio) 1908. Ni scias, ke la medalo unue aperis en 1912. Do, kiel klarigi la jarindikon 1908? Ĉu antaŭdato? Kiu evento okazis en la monato junio de tiu jaro?

2.1.6. **medala rando:**

Triangula signo + "BRONZE"



medala rando:

triangula signo + "BRONZE"



2.2. Arĝentitaj ekzempleroj

Arĝent(it)a specimeno



Ĉu arĝentita falsajo?



D^{RO}

ZAMENHOF.

LA ELPENSINTO

pezo: 29,57 g

diametro: 41,8 mm

D^{FO}

ZAMENOF

LA ELPINSITO

pezo: 27,76

diametro: 41,8 mm

Ĉirkaŭa teksto: egalaj interspacoj inter la literoj; maldikaj reliefaj literoj sub la maldekstra roverso F. MAGDELAINE (nur parte legebla). La surteksto finiĝas super la maldekstra ŝultro.

Ĉirkaŭa teksto: malregulaj, pli “dikaj”, senreliefaj literoj kun malegalaj interspacoj. La surteksto (mankas du literoj kaj punkto) finiĝas en granda distanco per mallonga, dika “trabeto”. La nomo F. MAGDELAINE estas metata en la spaco inter la trabeto kaj la maldekstra ŝultro.

Rimarko 1: triangula signo kaj stampo BRONZE, kio pruvas ke la medalo estas arĝentita.



Rimarko 2: jen la 3a enigmo. Ĉu vere temas pri falsajo? Kial la reversa flanko estas identa al la reverso de la originala arĝentita medalo? Kial tiom da eraroj en la aversa flanko? Kio estis la celo de la falsinto, tiel fuŝante?

Bibliografio: Hans Jankowski: “Esperanto Medaloj 1912-1995” p. 5.

“Esperanta Numismatiko” : vidu enkonduko de ĉi artikolo

ESPERANTAJ VALORMARKOJ

“Olimpiada garantifonda marko”



Enkonduko

Inter la du mondmilitoj esperantistoj serĉis kontakton kun la mondo de la sportoj, ĉefe de la moderna olimpika movado, fondita de Pierre de Coubertin, la iniciatinto de la unuaj modernaj olimpiaj ludoj en Parizo, en la jaro 1896.



Fine de la 19a jarcento laboristaj partioj kaj asocioj retiriĝis de la “etburĝa” sporta mondo. Aktive sporti estu preparado al vivo en socialista komunumo. La unua “Arbeiter Olympiade” okazis en 1925 en Germanio (Frankfurt am Main). Por vere tuŝi la temon de ĉi artikolo, ni devas nepre fokusi la duan laboristan olimpikon, kiu okazis en 1931 en Vieno (Aŭstrio).

Priskribo de la olimpika glumarko

Okaze de tiu evento la esperantistaro eldonis “garantifondan markon” surbaze de la porokazaj germanlingvaj afiŝo kaj poŝtkarto (vidu p.13).

Dekstre: la esperanta flanko.

Maldekstre: la originala, germana afiŝo (aŭ poŝtkarto). Montrata estas gimnasto kun mallonga, ruĝa gimnastika sportkuloto. Per la maldekstra mano li levas globon ene de dentorado, per la dekstra li ĉirkaŭpremas martelon.

Fone oni vidas ruĝajn flagojn, inter kiuj flago kun la teksto “2.ARBEITER OLYMPIADE”. Cetere partojn de panoramo de la urbo Vieno.

La mezuroj de la marko provizore al ni estas nekonataj.



Kion signifas “garantifonda marko”?

Verdire ni ne scipovis respondi sen iu dubo. Tamen, nia samideano Marc Vanden Bempt el Loveno (Belgio) tiel provas klarigi la signifon:

“Kiam ni (la asocio Esperanto 2000) ekorganizis la IJK-n en 1982, ni eksciis pri iu “garantia fonduso”. Tio ne estis vera (leĝa) fonduso, sed nur garantia deklaro, kiun ni povis subskribigi de konatuloj, simpatiantoj k.s. Ili per ĝi deklaris ke, se la IJK alportos (ĉar oni subskribu antaŭ julio 1982) malprofiton, ke tiam ili pagos iun sumon, menciitan sur la formulareto, por malpliigi tiun malprofiton. Kio do donis iom da certeco al la Loka Kongresa Komitato. Feliĉe ni fine ne bezonis ilin...”

Marc serĉis ankaŭ per Google kaj trovis interesan informon pri la laboristaj olimpikoj i.a. en “Aŭstria Esperantisto” 1930, n-ro 62, feb, kiu mencias artikolon en “Stunde”, 19.XII: “2. Laborista Olimpiado okazos en Vieno 1931. Ĝus oni eldonis apartajn glumarkojn kun jena surskribo: Garantifonda marko por la 2. Laborista Olimpiado Vieno 1931.”


Ankaŭ sinjoro Bernd Krause en artikolo “Esperanto kaj la Olimpikaj Ludoj – Aspektoj de kontakto” (en “Informilo por interlingvistoj” p. 18), mencias la specialan markon, sed bedaŭrinde ne klarigas ties rolon aŭ funkcion.

Marc krome mencias paĝon pri “Waschsalon Karl-Marx-Hof”, kiu ĉi-jare (2020) ĝis venontjare organizas ekspozicion pri la iama laborista olimpiko en Vieno. En tiu ekspozicio estas montrata la plej eta ekspoziciaĵo: ĉi tiu rara garantia marko!

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion. Ni bezonas helpon de niaj legantoj!

18a enigmo



Ĉefe ni petas la helpon de niaj hungaraj membroj por sendi informojn pri tiu marko. Eble estis valormarko por rabato. Surteksto:

LIBRO-MARKO
ESPERANTO KULTUR
PROPAGANDA INSTITUTO
BUDAPEST
10 fillér

19a enigmo



Nekonata, unuflanka (?) medalo, probable el bronzo. Jarindikoj: 1887 ★ 1937.

Surskribo: ESPERANTO

KONGRESO

ZAGREB

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Fidata mono: novaj perspektivoj! (1)



Enkonduko

Fidata mono estas fidinda pagilo. “Fidata” devenas el la latina kaj signifas “bazata sur fido”. En diversaj landoj oni uzas la terminon “Fiat-mono”. Ankaŭ tiun vorton ni dankas al la latina. Fiat signifas: “estu farita” aŭ “estu”. La uzo de mono ne funkcias sen fido, sed kio estas la fundamento de tiu fido?

La malo de fidata mono estas *varmono*. La valoro de tiu speco de mono baziĝas sur la uzata nobela metalo, kiel oro kaj eĉ arĝento. Varmono estis akceptata de la primoneraĵaŭtoritatoj kaj de la monfaristoj, ne nur kiel kalkulunuoj, sed ankaŭ kiel valortena aĵo kun esenca valoro pro la titro de oro aŭ arĝento.

La nominala valoro de fidata mono do ne plu dependas de certaj pezo kaj titro de nobelaj metaloj, sed de la fido montrata de la ekonomiaj agantoj koncerne la valoron de la monunuoj. Tiu fido estas bazata sur la ekonomia situacio kaj sur leĝa fundamento. Ekzemple, la valoro de la aktuala eŭro dependas de la relativa ekonomia situacio de la landoj de la Eŭropa Unio kaj ilia loĝantaro, la impostpagantaro. Sekve ĝi ankaŭ dependas de la fakto, ĉu la eŭropaj civitanoj jes aŭ ne fidus la registarojn kaj la Eŭropan Centran Bankon. Tiu banko prirespondas la monan politikon kaj la administradon de la eŭro. Tamen, la civitanoj ne povas ne uzi la eŭron, ĉar ĝi estas deviga kaj laŭleĝa pagilo. Tial ni povas uzi la terminon “fiatmono”, ĉar “fiat” en si havas la signifon “deviga aŭ laŭdekreta”. Ofte oni ankaŭ uzas la terminon “ŝtata mono”, kiu estas uzenda kiel laŭleĝa pagilo, ĉefe por pagi impostojn.

Konciza historio de fidata mono

La estiĝo de fidata mono situis en la eldonado de paperaj tratoj. Trato povis esti havigata de banko al distingita kliento, por havigi al li en aliurba banko la saman kvanton de arĝentaj aŭ oraj moneroj. Tiel ĉefe riĉuloj povis ekvojaĝi kun nomatrato, sen zorgoj pri eventuala ŝtelo de oro aŭ arĝento. Tio estis speciala servo, sed ne nur por aristokratoj, sed ankaŭ por registaroj. Estis do speco de sennoma trato per kiu iu ajn banko, rajtigata de la ŝtato, povis apogpagi sumon en orbrikoj. La banko de Amsterdamo (Nederlando) tiel agis jam je la komenco de la 17a jarcento. En 1688 la “Bank of England” ricevis la rajton eldoni paperan monon, i.a. por financi la ŝtatan ŝuldon de Anglio. La celoj estis unuflanke ŝirmi la paperan monon per oro kaj aliflanke plejeble malofte cirkuligi ĝin, por ke oni ne perdu fidon rilate al tiu sistemo. Ekde tiam la graveco, unue de perarĝenta, sekve de perora ŝirmado, daŭre

malkreskis. Dume, la potenco de la bankoj senĉese kreskis. Arĝentaj kaj sekve oraj moneroj (kiel la dekguldenaĵoj) estis paŝon post paŝo malcirkuligataj de la centraj bankoj.



Kelkaj tipoj de dekguldenaĵoj el Nederlando

Grava ŝanĝo okazis post la dua mondmilito, kiam nur Usono restis vera mondestra potenco. La usona dolaro iĝis la nura tutmonda rezerva monunujo kun kiel “monestro” la t.n. “Federal Reserve”. Por progresive evoluigi la globan ekonomion la t.n. sistemo de Bretton Woods estis lanĉata. Rimarkeble, nur la dolaro je fiksa kvanto da oro estis interŝanĝebla ĉe la Centra Banko. Por ĉiuj aliaj valutoj fiksa kurzo kun la dolaro estis precizigata, sed ili ne estis senpere interŝanĝeblaj kontraŭ oro. Tiel la sistemo kondukis al la elkonduko de la t.n. “ornormo”. La Internacia Mona Fonduso kaj la Monda Banko estis establita por la kreskigo de la evolulandoj kaj por efike kaj energie reagi okaze de akuta financa krizo.

Tamen, la sistemo de Bretton Woods estis malkonstruita inter la jaroj 1971 kaj 1973, post kiam Usono unuflanke nuligis la interŝanĝeblecon de dolaroj kontraŭ oro. Ĉiel, la dolaro, kaj do ankaŭ Usono mem, ĝis hodiaŭ estas la estro de la monda ekonomio surbaze de la PetroDollar Warfare, la praktikado de la absurda frakcia bankado. Sekvis tiel la senreguligo kaj la tutmondigo de la financaj merkatoj pro la agado de la okcidentaj financaj centroj kaj ĉefe de la bankoj kiel J.P. Morgan kaj Goldman Sachs en Wall Street. Ekde la kreditkrizo en 2008 la fido estas grave damaĝita, kaj la sistemo daŭrigas la agadon nur per la politiko de “Quantitative Easing”.

La aktuala fidata mono iĝas daŭre malpli fidata kaj daŭre pli fiat-mono. La sistemo estas paŝon post paŝo malkonstruita de Ĉinio kaj Rusio. La t.n. AIIB, la novaj Silko-Vojoj, CFETS kaj Shanghai Gold Exchange estas peonoj de la kontraŭ-petrodolaro politiko, kiuj serĉas novan multpolusan potencan ekvilibron profite al la elituloj en la Oriento. Aktuala ekzemplo estas la decido de *Rosneft* ne plu uzi la dolaron por prezoj kaj fakturado.



Daŭrigota

MEDALISTOJ

23. Aleksandr Solomin (°1941)



Aleksandr Solomin naskiĝis la 4an de julio 1941 en Moskvo kaj li, juna infano, spertis la amarajn vivkondiĉojn kaŭze de la kruelaĵoj de la hitleranoj en Ruslando dum unu el la plej teruraj militoj en la moderna historio. Nuntempe li loĝas en Odeso (Ukrainio).

En 1965 li sukcese finis la studadon en “Odesa Politeknika Instituto”.

Li baldaŭ ekmontris sian talenton. Pri li estas dirata, ke li havas “helan desegnan kapon kaj orajn manojn”. Solomin estas generanto de originalaj ideoj kaj kreinto de Esperanta Pupteatro. La pupojn li mem kreas kaj produktas. Li ankaŭ estas talenta direktoro de prezentadoj de odesaj esperantistoj en la baltaj ŝtatoj (Smolininkaj, Kose, Kaunas).

Pri Esperanto li unuafoje aŭdis en novembro 1983. Li lernis la internacian lingvon kaj membriĝis en la odesa Esperanto-klubo “Blanka Akacio”. Lia unua Esperanto-instruanto estis Semen Vajnblat.

Dank’al sia mastrado de Esperanto, Aleksandr partoprenis diversajn internaciajn eventojn en orienta Eŭropo, ankaŭ en Kubo, Andoro kaj Israelo.



Okaze de la 200-jariĝo de la urbo Odeso, li kreis en 1994 unikan argilan medalon, priskribita en “*Esperanta Numismatiko*”, jk.7, n-ro 1, p.12.

Ni kore dankas pro la informoj niajn membrojn Tamara Popova kaj Tatiana Mihno el Ukrainio

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Kio estis CSIE ?

A. Correspondance Scolaire Internationale par l'Esperanto



Ĉi tiu “brustostelo”, post tre multaj jaroj, okaze de aŭkcio, fine elmontris sian sekreton, dank'al hazarda legado de artikolo en Interreto pri la Pedagogio Freinet. **Ĝia tiama funkcio tamen restas enigma.** Diametro: 47 mm; pezo: 16,72 g.

Meze troviĝas siglo kun ruĝaj majuskloj C, I kaj E, krome kun blanka litero S. La supra banderoleteto kun teksto “BONVENO (*tiel!*) AL ĈIUJ” estas malhelblua. Kune kun tiu blua koloro, la ruĝaj literoj kaj la blanka litero probable reprezentas la tri kolorojn de la franca flago. La majuskloj reprezentas la vortojn *Correspondance Scolaire Internationale par l'Esperanto* (*Korespondado Lerneja Internacia per Esperanto*) = Internacia Lerneja Korespondado per Esperanto.

Tute sube oni vidas du orkolorajn antaŭbrakojn, kiuj simbole montras bildon de manpremo.

Reverse troviĝas nur pinglo super orkolora fono kaj stampo de la farejo:

“E. HERICOUR (= HERICOUR) PARIS 45 R(ue) DES ARCHIVES.

“Tiu ‘brustostelo’ estis desegnita de la itala esperantisto Aĥilo Tellini kaj kreita por la Klubo de Kolektantoj Concordia, fondita en Parizo en 1903, societo pri internaciaj studoj kaj korespondado”. (Elda Doerfler en “La Verda Lupeo”, n-ro 180, p.9)



B. Historio de CSIE

En artikolo de oktobro 1932 en la revuo “L'Éducateur Prolétarien” (la proletara edukisto), n°1-année 1932-1933, organo de ICEM (Coop' ICEM), “Institut Coopératif de l'École Moderne”, por la lerneja instruistaro, oni legas la jenan mesaĝon en la franca: “La

kamaradoj, kiuj deziras profundiĝi en la studo de Esperanto, povos partopreni en la KURSO PER KORESPONDADO organizata de la “Servo pedagogia esperantista, 96, St-Marceau-strato - Orléans (Loiret). Tiu organizo havigas adresojn de korespondemuloj, revuojn kaj ĉiujn informojn, utilaj por la praktikado tutmonda de Esperanto (...).”

Post diversaj administradaj informoj kaj reguloj koncerne la korespondadon, sekve aperas en Esperanto jena originala mesaĝo.

Atentu: la redakcio de ENA ne korektis la erarojn en la suba, originala teksto!

UNUA LETERO AL NIAJ
GEKAMARADOJ
CIULANDAJ GEEDUKISTOJ

Saluton, karaj gekamaradoj!

Unua laborjaro certigis al ni la efikon de viglaj interrilatoj kun la eksterlandaj gekolegoj. Bedaŭrinde, pro iu kaŭza afero, malofte estis al ni eble daŭre interrilati kun ĉiuj niaj gekamaradoj, kaj ankaŭ enpresigi la interesajn raportojn, de ili tre ofte verkĉitajn.

Por individua interkorespondo nur ekzistis ĝis nun, tre malofte la ebleco. Verdire se ne estas konsiderintaj kiel nia cefa laboro, la peradon de gekorespondantoj inter geedukistoj kaj geinfanoj aŭ gejunuloj de ĉiuj landoj, ni devas konfes ke ni ne havigis al ni la deziritan adresaron. Ni tamen turilate povas raporti pri gojegaj progresoj. Car ni pensas ke la individua korespondado havos grandan valoron, ni laŭeble ankoraŭ pligrandigos la nombron de peradoj. Sed por tio via helpo nepre estas necesa.

Nia revolucia laboro en ĉiuj landoj de la mondo nur povos prosperi, se vi ĉiuj laŭpove, subtenos nin per via kunlaborado, ankaŭ laŭeble aŭ laŭokase per monaj subtenoj. La vasta teritorio de nia laborkampo estas prilaborat de multaj bonvolnaj sekretarioj. Dank'al ili, ni forte esperas ke nia laboro en la estonteco progresos rapidpase.

Por ke aliflanke, niaj eksterlandaj gekamaradoj kiel eble plej akurate sin informu pri la progresoj kaj okazintaĵoj de nia movado, por ke ni mem, franca avangardaj geedukistoj konatigu kun la eduka afero kaj la Esperanto-movado sur la tutan mondon, necesas ke ni informigu unu la alial laŭprave. Tial ni intencas ĉiumonate laŭ la eblecoj, dediĉi “De Eksterlando por Eksterlando leterojn” La “leterajn” informajn ni ne prezentos nur franclingve, sed ankaŭ, laŭplace, en la angla kaj germana lingvoj, plejofte peresperante. Per tiuj diverslingvaj eldonoj ni esperas interrilati en estonteco kun kiel eble plej granda nombro da samideanoj.

Pri monaj subtenoj, mi bone scias ke estas por la plimulto tre bedaŭrinda fakto, la nuna ekonomia krizo. Sed ni estas de nun certaj pri viaj afablaj klopodoj, nelacigeblaj. Vian kunhelpon ni dankplene ricevus per sendado de ilustradoj el viala urbo aŭ lando, gazetoj, diversspecaj porinfanaj eldonaĵoj kaj perinfanaj verketoj. Ni laŭplace rekompencos. Pripensu ke ni, la esperantistaj edukistoj havas plej belan taskon inter la edukistaro, montri al la hezitemuloj, al la nekredemuloj kiuj ofte malfavoras nian lingvon, ke ĝi cefe taŭgas por unu el la plej interesaj branĉoj de nia agado

Samtempe, permesu averton pri la venontaj verkoj. Se ili ne estos legeblaj, kompreneble ni ne povos kompreni kaj aperigi. Se vi ne havas skribmasinon, ĉiam skribu, tre legeble, car ĉiu nacio havas sian propran skribmanieron, kiu ofte estas tre malfacile komprenata de alilanduloj. Mi ĉiujn fervore antaŭdankas!

Miaflanke de nun mi certigas al vi nelacigeblan servoprotecon por ĉiam kaj pli kontentigi viajn plej karajn dezirojn.
H, BOURGUIGNON.

La kunlaborantoj bonvolu anonci sin kun apartajn dezirojn, kiel eble plej frue al: H. BOURGUIGNON, Instruisto, Cefredaktoro de la Internacia Rubriko en “Presarto ce Lernejo”. Saint-Maximin-1a-Ste-Baume (Var) Francujo.

TERMINARO

Alfabeta Listo (23)

Blanko: *truista, neuzita metala disketo, farita por stampi monerojn aŭ medalojn.*

Cizelado: *prilaborado, per ĉiziletoj, de fanditaj objektoj, kiel medaloj. Ankaŭ aplikata de falsistoj por kamufla la videblajn erarojn de fandaĵo.*

Devaluto: *malpliigo de la de registaro fiksita valoro de monunuoj rilate al la normoj de noblaj metaloj (oro aŭ arĝento) aŭ rilate al eksterlandaj monunuoj.*

Fiatmono: *en diversaj lingvoj sinonimo por fidata mono. Termino ankaŭ uzata de klientoj de kriptomono. La valoro nur dependas de blinda fido je la flanko de la klientoj.*

Fidata mono: *mono sekurigata ne per la intrinseka valoro de la materialo uzita por la fabrikado, sed per la garantio, ke per ĝi povas esti aĉetataj varoj kaj servoj.*

Frakcia bankado: *sistemo per kiu komercbankoj disponigas nur parton de la al ili konfiditaj financaj rimedoj kaj pruntedonas la plimulton de la kapitalo, malgraŭ la laŭleĝa devo de tuja repago petata. Do, nur parteto de la rezervo estas sekurigata.*

Ĝustigado: *adaptado de la pezo de blanko per defajlado de la metala disketo.*

Inflacio: *ekonomia malekvilibro, karakterizata de ĝenerala plialtiĝo de la prezoj, troa plimultiĝo de la papermona kvanto en cirkulado kaj daŭra maladaptiĝo de totalaj proponoj kaj postulo.*

Interna valoro: *la valoro de moneroj, kalkulita laŭ la taga valoro de noblaj metaloj.*

Kambia kurzo: *aktuala valoro de naciaj monunuoj rilate al ĝeneralaj vendado kaj aĉetado.*

Kordono: *plialtigita rando kun plata supraĵo favora al preciza stakigo de moneroj, kiu samtempe protektas la monerfiguron.*

Kriptomono: *valoro surbaze de sumo de kriptaj valutoj. Tio estas speco de diĝita monunuoj, tre ofte uzata kiel alternativa mona sistemo por la oficialaj monunuoj. La valoro dependas nur de blinda fido de la kliento.*

Ornormo: *aktuala valoro de certa pezo de oro.*

Polurita: *por specialaj, pli valoraj emisioj, la stampilo kaj la blanko estas polurataj. Tamen, nur la fono estas polurita, ne la malpli altaj partoj, kiuj tiel restas malbrilaj (grizaj). Ĉiu monero aŭ medalo estas aparte stampata kaj severe kontrolata.*

Trato: *speco de kambio, per kiu tratanto devigas la trataton pagi je difinita dato monsumon al profitanto aŭ al la persono montrita sur la ĝiro aŭ al nenomita prezentonto.*

Varmono: *mono kies valoro estas ŝirmata kaj sekurigata surbaze de noblaj metaloj, kiel oro aŭ arĝento (vidu ankaŭ: fidata mono).*

NUMISMATIKA FORUMO

Nuntempa medalarto

Kiel por aliaj specoj de moderna arto, ne eblas akurate difini la nuntempan medalarton.

La skulpturo, al kiu afinas la medalarto, probable estas la artobranĉo, kiu plejble ŝanĝiĝadis rilate al ideologiaj kaj aliaj postuloj kaj ankaŭ el teknika kaj teknologia vidpunktoj.

Krome, la medalarto tute ne estas facila artobranĉo. Ĝi postulas teknikan talenton, kreivecon kaj analizopovan menson kaj fine la kapablon krei sintezajn formojn.

Ofte medaloj estas reflekto de la personaj konceptoj kaj de la ĝenerala mondkoncepto de la artisto. Li do povas figuri certajn ideojn, krome famajn personojn aŭ eventojn.

Tamen la artistoj ofte estas instigataj esplori proprajn konceptojn, proprajn artajn principojn, ĉar, kiel mi ĉiam emfazas, medalo unuavice tradukas “mensan raŭmon”: tion, kio estas videbla kaj tion, kio estas latentaj: emociojn, individuajn spertojn kaj sensaĵojn, naskiĝintajn el la fantazio kaj la sentiveco de la artisto.

Per la medalo estas vibrigataj ankaŭ la interesoj kaj la sentiveco de la nuntempa observanto kaj tio estas tute esenca aspekto.

Hanna Jelonek



Kelkaj medaloj de la medalisto Paul Huybrechts (Belgio)

EL LA GAZETARO

Parlamenta medalo por Povilas Jegorovas

Afiŝita en 8 Februaro 2020 de La redakcio



La 4an de februaro 2020 la seppersona konstanta komisiono de la Litovia parlamento (Sejmo) per sekreta voĉdonado decidis atribui la parlamentan medalon de Gabrielė Petkevičaitė-Bitė “Tarnaukite Lietuvai” (Servu al Litovio) al la multjara prezidanto de Litova Esperanto-Asocio **Povilas Jegorovas** pro lia esperantista agado.

La medalo, establita en 2011, havas la nomon de la elstara Litovia virino Gabrielė Petkevičaitė-Bitė (1861–1943) pro tio, ke, krom multaj aliaj tre gravaj agadoj, ŝi estis membro de la unua Sejmo kaj, kiel la plej aĝa membro, prezidis la unuan kunsidon de la parlamento la 15an de majo 1920.

Ĉi tiu plej alta distingo de la Litovia parlamento ekde 2011 estas ĉiujare atribuita al maksimume 16 eminentaj personoj – po maksimume al kvar personoj en kvar diversaj kategorioj pro volontula socia agado. Povilas Jegorovas ricevis medalon en la kategorio “Pro disvastigo de kulturo de volontula agado”. Per ĉi tiu medalo oni mencias meritojn al la Litovia ŝtato kaj ties bono, iniciaton kaj realigon de pozitivaj ideoj por civitana socio, nacia kaj kultura konscio.

Siajn rekomendojn al la parlamenta komisiono por dekori Povilas Jegorovas per ĉi tiu medalo prezentis jenaj personoj kaj organizaĵoj:

1. Eksa Membro de Eŭropa komisiono Vytenis Andriukaiĉs.
2. Eksa prezidanto de Sejmo Ĉeslovas Jurŝėnas.
3. Parlamentano Tomas Tomilinas.
4. Eksterordinara kaj plenrajta ambasadoro Rimantas Ŝidlauskas.
5. Verkisto kaj ĵurnalisto Laimonas Inis.
6. Monda centro de litovoj pri scienco, kulturo kaj edukado.
7. Litovia libroamanta societo.

La decido de la komisiono estas publikigita en la retejo de la parlamento kaj en multaj amaskomunikiloj de Litovio.

La enmanigo de la medaloj okazos en solena ceremonio la 27an de marto en Panevėžys. La medalojn enmanigos la prezidanto de la Litovia parlamento Viktoras Pranckietis.

Ni sendas korajn gratulojn al nia eminenta samideano okaze de plia ŝtata rekono de lia brila esperantista agado.

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

Ĉi tiu artikolo aperis en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*.

Ĉe represo aŭ citado bonvolu nepre indiki la fonton:

La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2020/02/litovio-37>

La ENA-redakcio kore dankas la kolegaron de “La Ondo de Esperanto” pro la permeso kopii la artikolon.

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

10.07.2020 12:46

Kara Jozefo!

Jen la nova numero de la ENA-revuo. Mi scias, ke vi aktuale havas multan laboron preparante vian novan terminaron. Mi esperas, ke mia sendita listo estas taŭga. Mi evidente estas scivolema kiujn vortojn vi elektis por via vortaro. Mi deziras al vi sukceson!

La provlegado ne urĝas. Se nur mi povus dissendi la revuon je la fino de la monato.

Kiel kutime mi tutkore antaŭdankas vin.

Amike kaj numismate,

Bert

17.07.2020 13:31

Kara Bert,

ĉi-kune mi sendas nian revuon kun miaj korektosugestoj. Krome jen kelkaj klarigoj:

ĉi: antaŭ substantivo sen "-", antaŭ adjektivo, adjekto kun "-", do *ĉi jaro* (egalas al ĉi tiu jaro; uzu prefere ĉiam kun *tiu*) kaj *ĉi-jara*, *ĉi-jare*.

nur: estu ĉiam antaŭ la vorto, al kiu ĝi rilatas, do *nurmi* legas libron, mi *nurlegas* libron, mi legas *nurlibron*.

Du spacetoj unu post alia: estas simple kontroli kaj anstataŭigi ilin per unu spaceto. Zairio nomiĝas nun jam DR Kongo. La Esperanta Civito flegas kontaktojn kun Kabindo. D-ro Joël Batila, kanceliero de la Kabinda Respubliko estas senatano de la Esperanta Civito. (Vd. ankaŭ https://groups.google.com/forum/#!topic/etnismo/IDqD8-i_LBg)

forinto: en 1940-41 la hungara valuto estis *pengő* (pengo), kiu estas propre mallongigo de *tintanta (pengő) forinto*, do metala forinto. Tamen pengo kaj forinto diferencendas. Forinto (el la itala fiorino) estas refoje valuto ekde 1947. Unue forinto estis pagilo de 1325.

decimaloj: ĉe decimaloj uzindas komo anstataŭ punkto laŭ la Monato-konvencioj.

Agrablan somerumadon, se eblas en tia pandemia tempo, mi deziras al vi kaj al viaj gekaruloj!

Amike: Jozefo



20.07.2020 19:37

Informcele - Se tiu "senpaga" revuo interesas vin,
turnu vin senpere al **Bert Boon** (vidu retadreson en la lasta paĝo).

Kore,

Germain

20.07.2020 23:51

Saluton Bert kaj Germain,

Dankon pro la sendo de tiu nekutima kolekto.

Mi trafolumis kaj ĝuis. Kia da laboro, kia da ordo, da precizo, da diverseco.

Mi salutas Julian, la eldonon de 2020, ŝi valoras kaj samtempe belaspektas.

Fartu bone bonvolu kaj kore salutas.

Mireille



21.07.2020 10:31

Dankon Bert nome de la legantoj el la "Esperanto-Libraro" en Bjalistoko kun bondeziroj.

Ela

bibliotekistino



21.07.2020 17:57

<https://www.google.at/search?source=univ&tbm=isch&q=klippe+m%C3%BCnze&hl=eo&sa=X&ved=2ahUKEwi1qZbv2d7qAhWNfMAKHUjzAMsQsAR6BAgKEAE&biw=1920&bih=924>

Kara Bert!

En EN 2020/3, paĝo 24 vi difinas, ke klipo (germane = Klippe?) estas misstampo.

Tio povas esti.

Sed mi havas la impreson, ke oni ofte tion produktis intence.

Salutas Walter

[https://de.wikipedia.org/wiki/Klippe_\(M%C3%BCnze\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Klippe_(M%C3%BCnze))

30.09.2020 16:39

Hiermit erlaube ich mir Ihnen mitzuteilen, dass in der Zeitschrift “Esperanta Numismatiko”, Jahr 2020, Nummer 3, ein Beitrag über die Silbermedaille “Julia Isbrücker 2020 – 50 Steloj” erschienen ist.

<http://frali.bplaced.net/ena/ena202003.pdf>

Seiten 14 bis 16.

Nochmals vielen Dank für Ihre Mithilfe!

Mit freundlichen Grüßen

Mag. Walter KLAG
Journalist und Herausgeber - La Bulteneto
Delegierter des Esperanto-Weltbundes
1190 Wien

2020 ist Julia Isbrücker-Jahr

Eine starke Frau – in Silber geprägt:



Esperanto weltweit:

<https://eventaservo.org/>

01.10.2020 9:34

Jen la respondo!

Kore salutas Walter

Von: Andexlinger Helmut

Gesendet: Donnerstag, 1. Oktober 2020 09:21

An: Esperanto

Betreff: AW: [EXTERN] Silbermedaille Julia Isbrücker 2020

Sehr geehrter Herr Mag. Klag,

Herzlichen Dank für die Übermittlung Ihres Artikels in der “Esperanta Numismatiko”. Es freut mich sehr, dass ich ein Teil dieses schönen Projektes sein durfte. Ich hoffe, dass es viele Interessenten und Käufer für diese attraktive Medaille gibt und würde mich freuen, wenn ich wieder einmal eine Idee von Ihnen umsetzen darf.

Ich verbleibe mit den besten Grüßen,

Helmut
Andexlinger



MÜNZE ÖSTERREICH AG

Am Heumarkt 1 · 1030 Wien · Österreich

Telefon 218 · FAX +43 1 717 15-214

Helmut.Andexlinger@muenzeoesterreich.at

www.muenzeoesterreich.at



28.07.2020 19:36

Bert,

Kun intereso mi eklegis la biografieton de Paul Kempeneers en la lasta numero de la ENA-bulteno. Mi esperis per ĝi povi kompletigi lian dosiereton, preskaŭ senenhavan, je <https://vikiflandrio.alcl.be/>. Tamen, 'mia' Paul Kempeneers estas de antaŭa generacio. Li dum multaj jaroj estis estrarano, ekzemple el Belga Esperantisto nov. dec. 1939:

Estrarano de "Belga Ligo Esperantista"

Prezidanto : D-ra Paul Kempeneers. 19, Avenue Montjoie,
Uccle. (Tel.: 44.53.00.)

Lastan mencion pri li mi trovis en Belga Esperantisto 373 (sept.-dec. 1961), kiam li estis konfirmita kiel honora prezidanto de BEF.

Mi retrovis lin en Esperanto en Belgio, feb. 1980:

El 'Esperanto en Belgio' feb. 1980

Kondolenco:

Je dimanĉo 23-a de decembro 1979 forpasis en Bruselo D-ro Paul KEMPENEERS en la aĝo de 84 jaroj. D-ro Kempeneers ludis graven rolon en la Esperanto-movado inter 1926 kaj 1955. Li estis prezidanto de Brusela Esperanto-grupo kaj de Belga Ligo Esperantista (la nuna B.E.F.) kaj estrarano de la tiama Internacia Esperanto Ligo, kiu postekunfandiĝis kun U.E.A. De 1947 ĝis 1955, li estis vic-prezidanto de U.E.A., En 1951 li prezidis la U.K.-n en Munkeno. Ankaŭ estis li aktiva en la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA) kies sekretario li estis de 1927 ĝis 1937. Dum tiu sama periodo, li eldonis la 'INTERNACIA MEDICINAN REVUO'-n.

Ĉu la du Paŭloj estas familianoj (patro-filo?) aŭ ĉu estas hazardo ke du gravaj esperantistoj havas la saman nomon?

Roland

29.07.2020 9:36

Saluton Roland,

Mi tre bone konas Paul T.C. Kempeneers, kiu ne estas parenco de lia samnomulo. La tienena Kempeneers estas doktoro-filologo, la brusela Kempeneers estis doktoro-kuracisto.

La filologo ankoraŭ vivas kaj tre aktivas kiel fakulo pri flandra toponimio, la kuracisto, el antaŭa generacio, jam mortis sufiĉe longtempe. Tamen pri la PK el Tienen, oni trovas malpli da informoj en la Reto. Tial mi dediĉas al li, surbaze de honora medalo (li ricevis du diversajn), la artikolon en la aktuala numero de la ENA-revuo.

Mi ne povas, bedaŭrinde, helpo kompletigi la biografion de "via" Paul Kempeneers. Eble ankaŭ li iam ricevis (esperantan) honoran medalon ...

Tamen, mi dankas vin pro via reago, ĉar nur malmultaj esperantistoj scias, ke Esperantujo hazarde havas du altmeritajn samideanojn kun la samaj nomoj.

Amike kaj numismate,

Bert



28.07.2020 16:01

Koran dankon, kara Bert, pro la lasta numero de ENA-revuo! Ĝia vesto tre belaspektas, same kiel interesa la enhavo., Kiel kutime, mi metas ĝin flanken, ĉar vere nun estas tro da aferoj en la kaldrono! Sed ne dubu, ke kiel eble plej baldaŭcion mi ellegos.

Amike,
via Elda



28.08.2020 6:42

Saluton el Kazaĥio!

Ĉu Vi povas sendi aliĝmesaĝon al miaj kazaĥiaj esperantaj amikinoj el urbo Ust-Kamenogorsk (Orienta Kazaĥio). Ili ankaŭ estas numismatoj kaj deziras esti membroj de ENA kaj ricevi Vian Bulteneton.

Sube iliaj kontaktoj: 1. Svetlana Birjukova
 2. Jelena Birjukova

Anticipo dankema al Vi kaj deziras ĉion bonan.

Amike kaj numismate,

Vjaĉeslav el Kazaĥio



29.08.2020 11:50

Estimata Sinjorino Flanagan!

Vian retadreson havigis al mi d-ro Gazzola, kies retadreson mi mem ricevis pere de mia amiko Renato Corsetti.

Kiel iniciatinto de la unua numismatika fakgrupo (2014) mi okaze de la ĉiujara UK ofertas al la LKK mian servon kiel numismato, kondiĉe ke la teamo konsentas, ke neniu alia memorajo tiel bele kaj akurate spegulas la superban eventon kiu estas Universala Kongreso.

Kroma argumento por Belfasto 2021 estas, ke esperantaj medaloj ŝajne en Irlando ne aŭ tre malofte estis eldonitaj (diru al mi ĉu mi eraras!) kaj ke la venonta UK estos la unua kiu okazos en via lando.

Diversaj aliaj landoj jam aperigis UK-medalojn; kun diversaj el ili ENA sukcese kunlaboris ekde la fondo de nia asocio. Ankaŭ Montrealo 2022 havos tiel sian medalon (ankaŭ unuafoje!). La proviza skizo kompreneble devos esti adaptata al la nova jaro2022.

*Por ebligi al vi kaj al via teamo trankvile pripensi kaj priparoli la eventualan projekton, mi aldone sendas al vi artikolon pri strategio kaj kun utilaj konsiloj, **kompreneble tute nedevige.***

Aldone ankoraŭ kelkaj ekzemploj de memormedaloj de pasintaj Universalaj Kongresoj.

Mag. Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

29.09.2020 18:27

Estimata Sinjoro Boon

Dankon por via mesaĝo.

Mi pardonpetas, ke ĝis nun mi ne respondis al vi.

Kelkaj el ni de la loka grupo feriiis, kaj aliaj estis tre okupitaj.

Neniu el ni havas sperton de la aranĝado de tiaj aferoj - kongresoj aŭ memormedaloj - do ni petis al UEA, ke ili konsilu nin pri tio.

Kiam ili decidis kion fari, ni povos diri al vi.

Intertempe, dankon pro viaj intereso kaj informo.

Bondezirojn,

Lorna

28.09.2020 15:48

Estimata Sinjorino Flanagan!

Multan dankon pro via afabla reago!

Mi bone komprenas, ke neniu el vi jam havas sperton pri la eldono de medaloj. Tial mi jam kunsendis informojn pri strategio, kun ekzemploj kaj konkretaj eblecoj. Vi evidente povus peti kromajn klarigojn al mi pri eroj aŭ detaloj. Ankaŭ mi pretas helpi kaj subteni via lokan grupon dum la tuta proceso, kiel mi sukcese rajtis fari por la LKK-oj de aliaj kongresoj.

Tamen, el pasinta korespondado kun aliaj asocioj kaj el propra sperto kiel membro de UEA, mi lernis, ke UEA ne volonte subtenas tiajn projektojn pro manko de helpantoj aŭ de mono, kvankam ili ne rifuzas partegon de la profito...

Mi sincere ne intencas puŝi vin, sed mi restos daŭre je viaj servo kaj dispono por realigi neordinaran memoraĵon pri la unua irlanda UK.

Dezirante al via tuta teamo kuraĝon kaj sukceson, mi salutas vin

amike kaj numismate,

Bert



25.08.2020 11:49

Kiel vi kaj via familio fartas? Mi esperas, ke tre bone kaj bonsane kiel ni!

En la revuo de ELF-Arek, "La Verda Lupeo", kies kunredaktoro mi estas, mi legis aperontan malnetan artikolon far Ĵenja, en kiu ŝi amplekse raportas pri la diversaj filatelaĵoj kiujn la LKK decidis eldoni okaze de la virtuala kaj de la 2022a UK en Montrealo.

*Iom mi, sincere dirite, envas tion, kvankam ankaŭ mi estas filatelisto... do mi petas vin, **se eble** sendi al mi raporteton pri la planoj kaj eventualaj ŝanĝoj kaj aliajn informojn koncerne la unuan UK- memormedalon en la historio de la kanada kaj de la ĝenerala Esperantomovado. Vi certe povas imagi, ke la 141 individuaj kaj la 22 asociaj membroj de ENA estas ege scivolemaj pri tiu venonta evento.*

Ĝi aperos unuapaĝe en la redakcia rubriko de la venonta numero de "Esperanta Numismatiko". Do, ne vere urĝas!

Mi tutkore antaŭdankas vin pro via kunlaboro!

Amike kaj numismate,

Bert Boon

01.09.2020 23:01

Kara Bert,

Dankon pro via mesaĝo.

Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne havas konkretajn planojn por la medalo aperonta okaze de la 107a UK. Mi certe volus presi iun medalon tiam, kaj mi supozas ke la dezajno ne estas tiom malsama ol tiu, kiun ni planis por la 105a (kvankam eble la logotipo ŝanĝiĝos). Tamen, malsame ol poŝtmarko, estas tre multekosta afero presi medalon, kaj mi ne havis la monrimedon fari tion por la virtuala kongreso. Sed mi certe intencas revivligi la projekton refoje, kiam niaj planoj por la venonta Montreala UK estos pli klaraj, eble dum 2021.

Mi certe sciigos al vi kaj al la legantaro de Esperanta Numismatiko tuj kiam mi havas novaĵon pri la medalo.

Deziras al vi bonan sanon kaj sukcesan numismatikan agadon,

Garry

02.09.2020 18:46

Kara Garry!

Multan dankon pro viaj reago kaj bondeziroj.

Mi tute ne plu konsideris la eldonon de la medalo okaze de la virtuala kongreso. Tamen mi ĝojas, ke vi daŭrigos la projekton por 2022. Tio donos pli da tempo por pli trankvile prepari diversaj aspektojn de la montreala UK. Mi ripetas, ke mi estas senĉese je via dispono, se mi povus kontribui al iu ajn projekto. Koncerne la medalon, mi estos preta ĝustatempe diskonigi tutmonde la eldonon de la medalo, se vi povos menciigi sendendulojn aŭ havigi al mi retan adresaron.

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

28.09.2020 12:35

Ĉefe ni petas la helpon de niaj hungaraj membroj por sendi informojn pri tiu marko. La ENA-redakcio tutkore antaŭdankas vin!



Eble estis valormarko por rabato. Surteksto: LIBRO-MARKO
ESPERANTO KULTUR
PROPAGANDA INSTITUTO
BUDAPEST
10 fillér

Mag. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
Fakdelegito pri numismatiko



28.09.2020 12:38

Ĉefe ni petas la helpon de niaj kroataj samideanoj por sendi informojn pri tiu medalo. La ENA-redakcio tutkore antaŭdankas vin!



Nekonata, unuflanka (?) medalo, probable el bronzo. Jarindikoj: 1887 ĉ 1937.

Surskribo: ESPERANTO KONGRESO ZAGREB

Mag. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
Fakdelegito pri numismatiko

28.09.2020 12:48

Pardonu, mi scias nenion pri tiu insigno. Mi plusendis vian demandon al Dokumenta Esperanto-centro.

Kore,

S. Ŝtimec

28.09.2020 12:47

Eble vi havas detalojn pri tio?

Spomenka

28.09.2020 14:15

Estimata Samideanino!

Multan dankon pro viaj rapidaj respondo kaj plusendo. Mi pacience atentos eventualajn informojn de la centro. La celo estas aldoni la zagreban medalon al baldaŭ farenda unua katalogo.

Amike kaj numismate,

Bert

28.09.2020 16:19

Jes, Spomenka, mi scias pri kio temas. Kaj mi eĉ havas du ekzemplerojn en la kolekto de DEC.

Ĝi ne estas medalo, sed insigno, kiun portis partoprenantoj de la 10-a kongreso de jugoslaviaj esperantistoj, okazinta en 1937 en Zagrebo. Mi klopodos baldaŭ verki klarigan artikoleon por "Esperanta Numismatiko" kaj sendi ĝin al samideano Bert Boon.

Josip Pleadin



28.09.2020 11:10

Kara kaj estimata S a m i d e a n o,

elkoran dankegon...

bedaŭrinde pro kelke da kialoj mi pli ol longege "silentis" ktp., se eblas, do mi petas Vian afablan pardonon...

En la Movado mi jam ne tro aktivis pro kelke da kialoj. Precipe tiu plejgrava estas tiu fakto, ke mi povas kun ĝojo ripeti, ke mia Filino Andrea (*1976) pli ol aktivis en la Movado. Ekde la pasinta jaro ankaŭ, kiel estrarano de ne nur CCEA... Pasintjare ankaŭ sukcese finis okjaran studadon ĉe tri, jes tri altlernejoj...

Mi estas precipe filatelisto kaj en kazo de nia Espo "nur" uzanto de la IL. Denove, post jaroj mi komencis partoprenadi per miaj E.filatelaj eksponaĵoj la filatelajn ekspoziciojn. Kun ĝojo mi povas mencii, ke denove sukcese. Aŭtune, pasintjare okazis en urbo LIBEREC la nacia (kun internacia partopreno, inkluzive fame konataj poŝtmarkoj de Mauritius) filatela ekspozicio... La prezidanto de la ekspozicia komitato menciis en la ekspozicia katalogo, ke vizitantoj de la ekspozicio povas en ĝi vidi tion plejbonan, kio momente estas en la CZ filatelo.

Mia eksponaĵo "Esperanto je tutajoj de Sovetunio" gajnis arĝentan medalon. Temis pri unusola E.eksponaĵo en la ekspozicio, kiu proponis pli ol cent plejbonajn filatelajn eksponaĵojn de nia Lando, kiuj povis partopreni tiun ĉi ekspozicion surbaze de plifruaj sukcesoj...

Mi scias, neforgesas, ke mi "ŝuldas" al Vi kopion de la filatela medalo kun Espo.

Do, fartu pli ol bonege kaj ĝis la ...

Kun bondeziraj salutoj restas

Vládda H.

28.09.2020 14:41

Kara kaj tre estimata Sinjoro Hasala!

*Multan dankon pro via reago kaj pro via intenco sendi al ENA kopiojn de la arĝenta medalo. Mi petas al vi, se eble, **aldoni informojn** por ebligi akuratan priskribon en nia estonta katalogo: **diametron, pezon, eldonkvanton, nomon de la medalisto.***

Mi unuavice ne forgesu gratuli vian filinon Andrea pro ŝiaj sukcesoj post okjara studado. Vere granda rezultato! Krome ĝojigas min, ke ŝi ankaŭ estas tre aktiva samideanino. Tiel, kiel patro aŭ patrino oni tutkore kaj prave fieras, ĉu ne?

Tamen mi ankaŭ kore gratulas vin mem pro la ricevo de la arĝenta medalo en Liberec. Tia agado sendube estas ankaŭ tre efika reklamo por nia movado kaj por la esperanta filatelo.

Krome estante(ĉefe) numismato, mi ankaŭ estas filatelisto, membro kaj kunredaktoro de La Verda Lupeo, kies prezidantino Elda Doerfler estas bonega amikino, kun kiu mi regule kunlaboras.

Ĝis baldaŭa reskribo! Mi sendas samideanajn salutojn al Andrea kaj al vi.

Amike kaj numismate,

Bert



29.09.2020 21:08

Estimata Sinjoro Povilas!

En "La Ondo de Esperanto" mi legis, ke al vi estis enmanigita en marto fama parlamenta medalo pro via grava esperantista agado. Permesu, ke mi gratulas vin plenrespekte kaj tutkore.

Ankaŭ el numismatika kaj historia perspektivoj tio estis grava evento.

Tial mi petas vin, se vi konsentas, sendi al la ENA- redakcio fotojn de ambaŭ flankoj kaj kelkajn necesajn numismatikajn informojn, nome: la diametron, la pezon, la metalon aŭ alojon kaj la nomon de la artisto-medalisto.

Mi antaŭdankas vin kaj vin salutas

samideane kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko





**RAPORTO PRI LA “PROJEKTO STELO”, REALIGITA ĈE LA ELEMENTA
LERNEJO CENTRO EDUCACIONAL EURÍPEDES BARSANULFO, BRAZILO**

Dum tri monatoj gelernantoj el la elementa lernejo *Centro Educacional Eurípedes Barsanulfo*, Brazilo, partopre-nis Esperantan projekton nomatan “Ste-lo”. La nomo referencas al la iam ekzis-tanta Esperanto-mono. La celo de la pro-jekto estis premii la partoprenantojn laŭ iuj kriterioj. Ĉiu lernanto ricevis ian monbileton, sur kiun la instruisto stampa-dus la emblemon de la projekto kaj nota-dus ĉiufoje la nombron de la akiritaj *ste-loj*. Por ricevi premion, necesus kolekti minimum dudek *stelojn*. La lernanto akirinta la plej multe da *steloj* en sia klaso ricevus aldonan premion.

La gelernantoj mem proponis, kiuj taskoj devus esti plenumataj kaj kiom da *steloj* ili valorus. Ekzemple, propagandi Esperanton ĉe sociaj retejoj valoris du *stelojn*. Tamen, la propa-gandinto ricevus *stelojn* nur en la okazo, kiam li sendis al la instruisto foton, por pruvi la faron (ekz. foton de la poŝtelefona ekrano). Interalie ili devus plenumi jenajn taskojn: *kunhavi la lernolibron de Esperanto; donaci propran, akiritan stelon al iu alia lernanto; kunporti en la klasĉambron alilandan objekton, kuriozaĵon; plenumi eksterlernejan (Esperantan) taskon, antaŭdifinitan de la instruisto; plenumi iun defion (ekz. solvi rebuson, literumi vortojn, parkeri bestonomojn, k.s.); ludi aŭ kanti Esperantan muzikon; gajni en RISKO-sesio; sendi al iu E-klubo mane kopiitan Esperantan poezion* – en tio helpis la instruisto per transdono de la poezia kolekto kaj de la adreso. Entute estas senditaj ĉirkaŭ 25 leteroj al E-kluboj el ĉiuj kontinentoj.

El la 90 partoprenintoj preskaŭ 50 akiris la minimuman nombron de *steloj*, kaj la plimulto ne akiris pro manko de ridinde malgranda kvanto. Fine okazis solena premiado kun la partopreno de la tuta lernejanaro kaj surpriza ekspozicio de vera Esperanta Stelmonero, aĉetita ĉe la libroservo de UEA. La premiitoj ricevis ekzempleron de la broŝuro “Malkovru Esperanton!” kaj Esperanto-glumarkon. La lernantoj kun la plej granda nombro de *steloj* en ĉiu klaso ricevis krome ekzempleron de la DVD-disko “Esperanto Elektronike”, eldonita de E@I.

La projekto premiis ankaŭ la lernanton akirintan la plej granda nombro de *steloj* el la tuta lernejo. Krom ekzemplero de la broŝuro, de la glumarko kaj de “Esperanto Elektronike”, li ricevis Esperantan brustoinsignon. Danke al la sukceso de la projekto, la lernejestraro asignis al ĝi sumon, per kiu estas aĉetitaj pluraj Esperantaĵoj por la lerneja biblioteko. Estas decidite, ke la projekto “Stelo” estos regule realigata. Espereble kun la sama sukceso. Ni aparte dankas al edukado.net pro oferto de materialoj, kiujn ni utiligis, kaj pro la ludo RISKO. Raporteto de LEK (Lerneja Esperanto-Klubo), Brazilo

La redakcio kore dankas la aŭtoron Leandro Abrahão pro la sendo kaj la permeso por publikigi la raporton.



Fotoj: Premiado; Monbileto; Mapokun la landoj al kiujnisendisleterojn; Ekspozicio de la Esperanta stelmonero.

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 143 individuaj membroj kaj 22 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skyne.be